## Sinteze

**176** La kredo estas persona aliĝo de la tuta homo al Dio, kiu revelacias sin. La Kredo inkludas ankaŭ la aliĝon de la racio kaj la volo al tio kion Dio revelaciis pri si en siaj agado kaj vortoj.

**177** "Kredi" inkluzivas pro tio duoblan rilaton: al la persono kaj al la vero; al la vero pro la konfido kiun oni donas al la persono, kiu ĝin asertas.

**178** Ni ne devas kredi al iu alia krom al Dio - la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

**179** La kredo estas supernatura donaco de Dio. Por kredi, la homo bezonas la internajn helpojn de la Sankta Spirito.

**180** "Kredi" estas konscia kaj libera homa ago, kiu bone ligiĝas al la digno de la homa persono.

**181** "Kredi" estas eklezia ago. La kredo de la Eklezio antaŭas nian kredon, ĝin naskas, kovas kaj nutras ĝin. La Eklezio estas la Patrino de ĉiuj kredantoj. "Neniu povas havi Dion kiel Patron, se tiu ne havas la Eklezion kiel la Patrinon".

**182** "Ni kredas ĉion entenatan en la Dia vorto, skribita aŭ tradicia, kaj en tio kion la Eklezio proponas kredi kiel die revelaciita".

**183** La kredo estas necesa por la savo. La Sinjoro mem diras: "Kiu kredas kaj estos baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredas mem kondamnos sin" (Mar 16,16).

**184** "La kredo estas antaŭgustumo de la kono kiu nin igos beataj en la estonta vivo".

Kontrolis kaj lektoris Antonio de Salvo okaze de la 65-a Kongreso de IKUE. Redaktis Marija Belošević.





## LA TRIA ĈAPITRO

## LA HOMA RESPONDO AL DIO

**142** Per sia anonco "la nevidebla Dio, en sia senfina amo komencas la komunikadon kun homoj kiel amikoj, kaj kun ili kunestas, por ilin inviti kaj allasi al la komuneco kun Li". Taŭga respondo al tiu alvoko estas la kredo.

**143** Per la kredo la homo tute submetas sian intelekton kaj sian volon al Dio. Per sia tuta estaĵo la homo donas sian jeson al Dio revelaciinto. La Sankta Skribo nomas "obeado de la kredo" ĉi tiun respondon de la homo al Dio kiu revelacias.

Artikolo 1

### MI KREDAS

### I. La obeado de la kredo

**144** Obei ("ob-audire") en la kredo signifas libere submeti sin al la aŭskultita vorto, ĉar ĝia vereco estas certigita de Dio, kiu mem estas la Vero. La modelo de tia obeo, proponata de la Sankta Skribo, estas Abraham. Virgulino Maria estas ĝia plej perfekta realigo.

ABRAHAMO - "PATRO DE ĈIUJ KREDANTOJ"

**145** La Letero al Hebreoj, en la solena laŭdo de la kredo de la prapatroj, aparte substrekas la kredon de Abraham: "Per la kredo, vokita, Abraham obeis kaj ekiris al loko kiun li devus ricevi kiel heredaĵon: li ekiris, ne sciante kien li iras" (Heb. 11:8). Per la kredo li restadis kiel fremdulo kaj pilgrimanto en la Promesita lando. En la kredo Sara ricevis kapablon koncipi la promesitan filon. Fine, per la kredo Abraham oferdonis sian solan filon.

**146** Abraham tiel realigas la difinon de la kredo laŭ la priskribo de la Letero al Hebreoj: "Kaj la kredo estas realigo de esperataĵoj, pruvado de aferoj ne vidataj" (Hebreoj 11:1). "Ĉar kion diras la Skribo? Kaj Abraham kredis al Dio, kaj tio estis kalkulita al li kiel virto." (Rom 4:3). Pro la fakto ke li estis forta pro sia kredo, Abraham iĝis la "patro" de ĉiuj kredantoj (Rom 4,11.18).

**147** La Malnova Testamento riĉas je atestoj de tia kredo. La Letero al Hebreoj laŭdas la elstaran kredon de la antikvuloj, kiuj pere de ĝi "ricevis" "bonan ateston" (Heb 11,2.39). Sed "Dio por ni antaŭvidis ion pli bonan": la gracon ke ni kredu je lia Filo Jesuo, "la aŭtoro kaj perfektiganto de la fido" (Heb 11,40; 12,2).

MARIA - "BEATA VI KIU EKKREDIS"

**148** Virgulino Maria realigis la plej perfektan ekzemplon de obeemo en la fido. En la fido, Maria akceptis la anoncon kaj la promeson al ŝi portitajn de anĝelo Gabriel, kredante ke "por Dio nenio estas neebla" (Luk 1:37), kaj donante sian konsenton: "Jen la sklavino de la Eternulo; estu al mi laŭ via diro" (Luk 1,38). Elizabeto salutis ŝin jene: "Kaj feliĉa estas ŝi, kiu kredis, ĉar plenumiĝos tio, kio estas dirita al ŝi de la Eternulo" (Luk 1,45). Pro tiu fido ĉiuj generacioj nomos ŝin beata.



**III. Nur unu kredo**

**172** Jam dum jarcentoj tra multaj lingvoj, kulturoj, popoloj kaj nacioj, la Eklezio ne ĉesas konfesi sian ununuran, de unu Sinjoro akceptitan, per unu bapto transdonitan kredon, profunde konvikite, ke ĉiuj homoj havas nur unu Dion kaj Patron. Sankta Ireneo de Liono, atestanto de tiu kredo, diras:

**173** "La Eklezio, kvankam disvastigita tra la tuta mondo ĝis la fino de la terspaco, ricevinte la kredon de la Apostoloj kaj iliaj disĉiploj (...), zorge gardas tiun proklamon kaj tiun kredon, kaj kvazaŭ ĝi loĝus en la sama domo, ĝi kredas sammaniere kvazaŭ ĝi havus unu animon kaj unu koron; kaj la verojn de la kredo ĝi predikas, instruas kaj transdonas unuvoĉe kvazaŭ ĝi havus nur unu buŝon".

**174** "Kvankam en la mondo la lingvoj estas diversaj, la enhavo de la tradicio estas sama. Nek alia kredo, nek alia tradicio estas de la Eklezio fondita en Ĝermanio, Iberio, ĉe keltoj, aŭ tiu en Oriento, en Egiptio, en Libio, aŭ tiu en la centro de la mondo". "Vera kaj fidinda estas la proklamo de la Eklezio, ĉar ĝi en la tuta mondo montras nur unu vojon al savo".

**175** "La kredon kiun ni transprenis de la la Eklezio, ni zorge konservas. Kiel iu grandvalora trezoro, fermita en speciala ujo, la kredo per la ago de la Dia Spirito konstante rejuniĝas, kaj igas ke rejuniĝu ankaŭ la ujo en kiu oni konservas ĝin".

la "Roma ritaro", la baptanto demandas la baptaton: "Kion vi petas de la Dia Eklezio?" Kaj tiu respondas: "La kredon". "Kion al vi donas la kredo?". "La eternan vivon".

**169** Savo venas nur de Dio, sed, ĉar la vivon de fido ni ricevas de la Eklezio, ĝi estas nia Patrino: "Ni kredas al la Eklezio kiel la Patrino de nia nova naskiĝo, sed ne al la Eklezio kvazaŭ ĝi estus aŭtorino de nia savo." Ĉar ĝi estas nia Patrino, la Eklezio estas ankaŭ edukistino de nia kredo.

## II. La parolo de la kredo

**170** Ni ne kredas al iuj formuloj, sed al la realoj kiuj per tiuj esprimiĝas, kaj kiujn al ni la kredo permesas "tuŝi". "La akto (de kredo) de la kredanto ne haltas je la eldiritaĵo, sed ĝi atingas la (eldiritan) realaĵon". Tamen, al tiuj realaĵoj ni alproksimiĝas per la helpo de la formuloj de la kredo. Ili permesas al ni esprimi kaj transdoni nian kredon, ĝin celebri en kunuleco, ĝin asimili kaj ĝin travivi ĉiam pli.

**171** La Eklezio, kiu estas "kolono kaj bastiono de la vero" (1 Tim 3,15), fidele gardas "la kredon, kiu iam por ĉiam estis transdonita al la sanktuloj". Ĝi konservas la memoron pri la vortoj de Kristo kaj ĝi de generacio al generacio transportas konfeson de la apostola kredo. Samkiel la patrino instruas infanojn paroli, kaj tiel kompreni kaj komuniki kun la aliaj, same La Eklezio, nia Patrino, nin instruas al la paroloj de la kredo, por nin enkonduki en komprenon kaj en la vivon de la kredo.



**149** Dum sia tuta vivo, kaj ĝis la lasta provo, kiam ŝia filo Jesuo mortis sur la kruco, ŝia fido neniam ŝanceliĝis. Maria ne ĉesis kredi "ke plenumiĝos" la Dia vorto. Tial la Eklezio respektegas Marian kiel la plej puran realigon de la fido.

## II. "Mi scias, kiun mi ekkredis" (2 Tim 1,12)

### KREDI JE UNU DIO

**150** Kredo unuavice estas persona aliĝo de la homo al Dio; samtempe, kaj nedisigeble de tio, ĝi estas ankaŭ libera konsento al la tuta vero, liun Dio revelaciis. Ĉar persona aliĝo al Dio kaj konsento al la vero de li revelaciita, la kristana kredo diferenciĝas de la kredo en iu homa persono. Estas bone kaj juste plene konfidi sin al Dio kaj nepre kredi tion, kion li diras. Male, estus vane kaj trompe doni tian kredon al iu homestaĵo.

### KREDI JE JESUO KRISTO, LA FILO DE DIO

**151** Por kristano, kredi al Dio estas nedisigeble kredi al tiu, kiun li sendis, lia amata Filo en kiu li havas plezuron; Dio diris al ni, ke ni aŭskultu lin. La Sinjoro mem diras al siaj disĉiploj: "Kredu al Dio, ankaŭ al mi vi kredu!" (Joh 14,1). Ni povas kredi al Jesuo Kristo, ĉar li mem estas Dio, la Vorto enkarniĝinta: "Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris" (Joh 1,18). Ĉar li "vidis la Patron" (Joh 6,46), li estas la sola kiu lin konas kaj lin povas revelacii al ni.

KREDI JE LA SANKTA SPIRITO

**152** Oni ne povas kredi je Jesuo Kristo, sen partopreni en lia Spirito: La Sankta Spirito revelacias al homoj, kiu estas Jesuo. Fakte, "neniu povas diri, «Jesuo estas Sinjoro», krom en la Sankta Spirito" (1 Kor 12,3). "La Spirito esploras ĉion, eĉ la profundaĵojn de Dio (...). Neniu scias la aferojn de Dio, krom la Spirito de Dio" (1 Kor 2,10-11). Nur Dio plene konas Dion. Ni kredas je la Sankta Spirito, ĉar Li estas Dio.

La Eklezio neniam ĉesas konfesi sian kredon en unu Dio Patro, Filo kaj Sankta Spirito.

**III. karakterizaĵoj de la kredo**

KREDO ESTAS GRACO

**153** Kiam sankta Petro konfesas ke Jesuo estas "Kristo, la Filo de la vivanta Dio", Jesuo diras al li: "tion ne revelaciis la karno kaj sango, sed mia Patro, kiu estas en la ĉielo" (Mat 16,17). La kredo estas donaco de Dio, supernatura virto donita de Dio. "Por ke oni ekkredu, necesas la Dia graco, kiu antaŭiras kaj helpas, kaj la internaj helpoj de la Sankta Spirito, kiu movu la koron kaj ĝin turnu al Dio, malfermu la okulojn de la animo kaj donu "al ĉiuj dolĉecon en la konsento kaj en la kredo je la vero".

KREDO ESTAS HOMA AGO

**154** Estas neeble kredi sen la graco kaj la internaj helpoj de la Sankta Spirito. Sed tamen ne malpli veras, ke origine la kredo estas



Artikolo 2

**NI KREDAS**

**166** La kredo estas persona ago: libera respondo de la homo al la iniciato de Dio kiu sin malkaŝas. Tamen, la kredo ne estas izolita ago. Neniu povas sola kredi, samkiel neniu povas sola vivi. Neniu donis la kredon al si mem, samkiel neniu al si mem donis la vivon. La kredanto ricevis la kredon de aliaj, kaj al la aliaj li devas ĝin transdoni. Nia amo al Jesuo kaj al homoj instigas nin ke al la aliaj ni parolu pri nia kredo. Tiamaniere ĉiu kredanto estas kvazaŭ ringo en la longa ĉeno de tiuj kiuj kredas. Mi ne povas kredi se mi ne estas subtenata per la kredo de la aliuj, kaj per mia kredo ni kontribuas subteni la kredon de la aliaj.

**167** "Mi kredas" estas la kredo de la Eklezio, kiun ĉiu kredanto, speciale en la momento de la bapto, konfesas persone. "Ni kredas": tio estas la kredo de la Eklezio, kiel ĝin konfesas la episkopoj kunvenintaj ĉe la Koncilio aŭ pli ĝenerale, la kredantoj kolektiĝintaj ĉe la liturgia solenaĵo. "Mi kredas": tiel parolas ankaŭ la Eklezio, nia Patrino, kiu respondas al Dio per sia kredo, kaj nin instruas paroli "mi kredas", "ni kredas".

**I. "Rigardu Sinjoro, la kredon de via Eklezio"**

**168** Antaŭ ĉio la Eklezio estas tiu, kiu kredas kaj tiel direktas, nutras kaj subtenas mian kredon. La Eklezio estas unuavice tiu, kiu ĉie agnoskas la Sinjoron, kaj kun ĝi per ĝi ankaŭ ni iĝas altiritaj kaj gvidataj konfesi la samon: "mi kredas", "ni kredas". Per la bapto de la Eklezio ni transprenas la kredon kaj la novan vivon en Kristo. En

devas preĝi al la Eternulo, ke li pligrandigu nian fidon. Ĝi devus esti per "amo aganta" (Gal 5,6), subtenata de la espero kaj enradikiĝinta en la kredo de la Eklezio.

## LA KREDO - KOMENCO DE LA ETERNA VIVO

**163** La kredo igas nin anticipe senti la ĝojon kaj la lumon de la beata vizio, kies celo estas nia surtera vojaĝo. Tiam ni spektos Dion "vizaĝ' al vizaĝe" (1 Kor 13,12), "kiel li estas" (1 Joh 3,2). La kredo estas jam la komenco de la eterna vivo:

> Jam nun ni kontemplas kiel en spegulo, kvazaŭ ili estus jam ĉeestantaj, la mirindajn realaĵojn rezervitajn de la promesoj kaj kiujn, per la fido, ni atendas ĝui.

**164** Sed nun "ni iru perkrede ne perrigarde" (2 Kor 5,7), kaj ni ekkonas Dion kiel "per spegulo, enigme (...) parte" (1 Kor 13,12). La kredo, lumoplena pro tiu, kiun ĝi kredas, tamen ofte estas travivata en mallumo. La kredo povas estis submetita al elprovo. La mondo en kiu ni vivas ofte ŝajnas tre malproksima de tio, pri kio la kredo montras al ni sekurecon; la spertoj pri malbono kaj suferoj, pri maljusteco kaj morto ŝajnas kontraŭdiri la Ĝojan mesaĝon. Ĉio ĉi povas ŝanceli la kredon kaj fariĝi tento por ĝi.

**165** Tial, ni devas nin direkti al la atestantoj de kredo; Abrahamo, kiu elkredis, "esperante malgraŭ ĉiu espero" (Rom 4,18), al Virgulino Maria kiu "survoje al la kredo" atingis ĝis la "nokto de la kredo" partopreninte la pasion de sia Filo kaj en la nokto de lia entombigo; kaj multaj aliaj atestantoj de la kredo "ĉirkaŭate de tioma nubego da atestantoj, ni formetu ĉiun ŝarĝon kaj la pekon kiu nin bridas, kaj ni persiste enkuru la batalon kiun ni antaŭstaras! Ni direktu la rigardon al la aŭtoro kaj perfektiganto de la kredo, al Jesuo"(Heb 12,1-2).



ago aŭtentike homa. Kontraŭas nek la liberecon nek la homan racion, ke la homo kredu al Dio kaj aliĝu al la veroj kiujn li revelaciis. Eĉ en la homaj rilatoj ne kontraŭas nian dignon, ke ni fidu tion kion la aliaj homoj diras pri si mem, kaj ke ni kredu iliajn promesojn (ekzemple, kiam viro kaj virino geedziĝas), por tiel eniri en reciprokan komunecon. Konsekvence, des malpli kontraŭas al nia digno "en la kredo, plene submeti nian intelekton kaj nian volon al Dio kiu sin malkaŝas", kaj tiamaniere eniri en intiman komunecon kun li.

**155** En la kredo, la homaj racio kaj volo kunlaboras kun la dia graco: "Credere est actus intellectus assentientis veritati divinae ex imperio voluntatis a Deo motae per gratiam - Kredo estas ago de la racio kiu, sub la impulso de la volo mvata de Dio per la graco, donas sian konsenton al la dia vero".

## KREDO KAJ INTELIGENTECO

**156** La kialo ke ni kredas ne konsistas en tio, ke la revelaciitaj veroj aperas kiel veraj kaj kompreneblaj en la lumo de nia natura racio. Ni kredas pro "la aŭtoritato de la Dio mem kiu revelacias, kiu povas nek trompiĝi, nek trompi". "Tamen, por ke la submetiĝo de nia kredo agordiĝu kun la racio, Dio volis ke al la internaj helpoj de la Sankta Spirito aldoniĝu ankaŭ eksteraj pruvoj de lia revelacio". Tiel la mirakloj de Kristo kaj de la sanktuloj, profetaĵoj, disvastiĝo kaj sankteco de la Eklezio, ĝia fekundeco kaj stabileco estas "certegaj signoj de la dia revelacio, taŭgaj por ĉiuj inteligentecoj", kialoj de kredindeco, kiuj montras ke la konsento al la kredo ne estas "blinda impulso de la Spirito".

**157** Kredo estas certa, pli certa ol ĉia homa ekkono, ĉar ĝi baziĝas je la vorto de Dio, kiu ne povas mensogi. Sendube, la revelaciitaj veroj ŝajni obskuraj povas al la homa racio kaj sperto, sed "la certeco kiun donas la dia lumo estas pli granda ol la certeco, kiun donas la lumo de la natura racio". "Dek mil malfacilaĵoj ne konsistigos eĉ unu dubon".

**158** "La kredo klopodas kompreni": estas karakterizo de la kredo, ke la kredanto deziru koni pli bone tiun al kiu li kredas, kaj pli bone kompreni kion li proklamis; pli profunda scio postulas siavice kredon pli grandan, ĉiam pli ardantan je amo. La graco de la kredo malfermas "la okulojn de la koro" (Efe 1:18) por viva kompreno de la enhavoj de Revelacio, tio estas de la tutaĵo de la Dia plano kaj de la misteroj de la kredo, de la interna konekso kiu ligas ilin reciproke kaj kun Kristo, centro de la revelaciita mistero. Nu, "por ke la kompreno de la Revelacio fariĝu ĉiam pli profunda, la Sankta Spirito konstante perfektigas la kredon per siaj donacoj". Tiel, laŭ la diro de sankta Aŭgusteno: "Kredu por kompreni: komprenu por kredi".

**159** Kredo kaj scienco. "Kvankam la kredo estas super la racio, inter kredo kaj racio ne povas esti vera malakordo: ĉar la sama Dio, kiu malkaŝas la misterojn kaj donas la kredon en la homa spirito, enplantis en la homan spiriton ankaŭ lumon de la racio, kaj Dio ne povas malkonfesi sin mem, nek la vero (povas) iam kontraŭdiri la veron". "Pro tio la metoda esploro eĉ ne en iu fako, se ĝi estas farita science kaj laŭ etikaj principoj, neniam vere kontraŭas la religion, ĉar sekularaj kaj religiaj faktoj radikas en la sama Dio. Eĉ pli, tiu kiu strebas humile kaj persiste esplori la sekretojn de la realo, eĉ se li ne konscias pri tio, estas kvazaŭ gvidata de la mano de Dio, kiu, plutenante la ekziston de ĉiuj aĵoj, igas ilin esti tio kio ili estas".



LIBERECO DE LA KREDO

**160** Por ke la kreda respondo estu homa, «estas fundamenta elemento... ke la homoj devas respondi al Dio kredante libervole; "pro tio oni rajtas devigi neniun aliĝi al la kredo kontraŭ lia volo; la ago de la kredo, ja, estas laŭ sia naturo libervola". "Certe Dio vokas la homojn ke ili servu lin en spirito kaj vero, kaj pro tio ili estas ligitaj konscience, sed ne devigitaj (...) Tio apertis plej eminente en Jesuo Kristo". Fakte, Kristo invitadis al la kredo kaj konvertiĝo, sed neniel li devigis iun al ĝi. "Li atestis pri la vero, sed li ne volis perforte trudi ĝin al tiuj kiuj kontraŭstaris. Lia regno (...) kreskas per la amo per kiu Kristo, levita sur la krucon, altiras al si la homojn".

BEZONO DE LA KREDO

**161** Kredi al Jesuo Kristo kaj al tiu, kiu lin sendis por nia savo, estas nepra por ke ni estu savitaj. "Ĉar sen la kredo ne eblas favoriĝi al Dio" (Heb 11,6) kaj kundividi la kondiĉon de liaj filoj, neniam iu sen ĝi povas senkulpiĝi kaj akiri en ĝi la eternan vivon se en ĝi li ne persistos ĝis la fino" (Mat 10,22 - 24.13).

PERSISTO EN LA KREDO

**162** La kredo estas donaco, kiun Dio havigas al la homo senpage. Tiun netakseblan donacon ni povas perdi. Tiusense, sankta Paŭlo atentigas Timoteon: "vi faru bonan batalon, tenante la fidon kaj bonan konsciencon, kiun forpuŝinte de si, kelkaj homoj ĝisvivis la dronadon de la fido (1 Tim 1,18-19). Por ke ni vivu, kresku kaj en fido persistu ĝis la fino, ni devas nutri nin per la vorto de Dio; ni